

Pos-Amiko

Somero 2021, numero 37

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. UEA finfine prezentas strategian planon
1. Oratora konkurso baldaŭ olimpika?
2. TEJO plivastigas partnerecon kun Google
2. Pretiĝu por reveni al normaleco
3. Kara Koko
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de

NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

UEA finfine prezentas strategian planon

Post preskaŭ kvar jaroj da sufero sen ajna strategio la estraro de UEA finfine prezentis dum la Virtuala Kongreso sian novan strategian planon por 2021-2025. La plano estas tre ampleksa kaj prezentita en bela dokumento, tamen la enhavo foje ŝajnas ne plene rilati al UEA.



Jen la plano

Ekzemploj de tiaj strangaĵoj estas la sekcio 'Kiel UEA laboru pri temoj specifaj al maljunaj esperantistoj kaj iliaj rajtoj?', la celo 'Aktiva engaĝiĝo en maljunularaj organizoj tutmonde' kaj la mencio de la reta kunlaborprogramo Slack. Ankaŭ rimarkindas, ke ofte aperas la vorto maljunularo, kaj ŝajne en pli malgrandaj literoj ol la ĉirkaŭa teksto.

Indus do pridemandi, ĉu la estraro de UEA ne simple rekte kopias la novan strategian planon de TEJO kun minimumaj ŝanĝoj, sed ĝia komitato ŝajne jam tiom kontentas pri la dokumento, ke ili preferas havi ŝtelitan planon ol havi neniun.

Oratora konkurso baldaŭ olimpika?

En la pasintaj jaroj la Oratora Konkurso de UEA spertis ondon de populareco. Nun la regula instanco de la sporto, la Konkursa Komisiono, volas fari sekvan ŝtupon, kaj aldoni oratoradon al la

programo de la olimpikaj ludoj. Tiu sporto estus valora aldono al la ludoj, ne nur ĉar ĝi reprezentas tute alian tipon de defio, uzante la cerbon kaj buŝon anstataŭ muskoloj, sed ankaŭ ĉar ĝi donus avantaĝon al UEA-membroj: ja laŭ la nunaj reguloj la oratorado devas okazi en Esperanto. Krome la fizika stato de multaj membroj ne ofertas alian ŝancon je olimpika sukceso.

TEJO plivastigas partnerecon kun Google

En aprilo la TEJO-retpaĝo fiere anoncis novan kunlaboron kun Google, en kiu la usona firmao ricevas aliron al la personaj datumoj de membroj. Tiu kunlaboro tamen ne pluiris post la 1-a de aprilo, kaj la afero ŝajnis finita. Sed en julio la afero ricevis novan atenton, kiam la prezidanto de UEA, Duncan Charters, laŭdis la sukceson de TEJO.

Post tiu rimarko la prezidanto de TEJO, Charlotte Sherping-Larsson, tuj vojaĝis al Irlando por negoci kun Google (kaj por aperi en radio-intervjuo). La plena interkonsento ankoraŭ ne estas publika, sed la Pos-Amiko ekhavis iujn ŝlosilajn informojn:

La firmao ricevas ne nur bazajn membrajn datumojn, sed ankaŭ informojn pri membrecoj en komisionoj, telegramgrupoj kaj uzado de glumarkoj, por plej bone povi persone spami uzantojn. Reciproke TEJO ricevas kontaktinformojn de ĉiuj spektantoj de Evildea kaj aliaj jutubistoj, vane esperante, ke ili faru iom pli por la movado ol sidi spektante ekranon.

Pretiĝu por reveni al normaleco

Jam preskaŭ jaron kaj duonon daŭras la malnormala 'nova normalo', kiu precipe forte batis la Esperanto-movadon tiom dependan de internacia vojaĝado. Por ke vi ne faru eraron en tiu ĉi nova malnova vivstilo, jen listo de utilaj konsiloj:

- Ĉeestaj renkontiĝoj ne havas silentigan butonon
- Vi denove bezonas duŝiĝi
- Ne plu necesas beligi muron de via ĉambro, aliflanke vi nun bezonas pantalonon
- Se eblas eviti tion, ni rekomendas daŭre ne tuŝi manojn de aliaj homoj
- Serĉu en vikipedio, kiel funkciis brakumoj
- La vojaĝo al laboro daŭros pli ol du minutojn
- Vi ne povas poste spekti registraĵon de hazarda diskuto

Kara koko...

“Mi ŝatus vojaĝi al vera Esperanto-renkontiĝo, sed flugado malbonas por la klimato. Kion mi do faru?”

Kara homo,

Ne zorgu, restas ankoraŭ multaj eblecoj por vi. Mi supozas, ke vi ne havas gravan laboron, ĉar vi estas ĉi tie en reta kongreso, do vi ja havas tempon. Do prenu vian biciklon, aŭ komencu konstrui velŝipon, kaj mem aranĝu vian vojaĝon. Ne forgesu kunporti sufiĉan akvon por kelksemajna irado.

Poso

Skribu viajn demandojn al

kkps.klackunveno@gmail.com

NEJ-Novajoj!

Retpaĝo de IJK 2022 pretas

Vi povas nun viziti la retpaĝon de la venontjara IJK, en <https://ijk2022.tejo.org/>. Legu pri la kongresejo, ĉambroj, ekskursoj kaj multe pli. Ankoraŭ ne eblas aliĝi, la aliĝilo malfermiĝos je sabato la 30-a de oktobro.

Membrokunveno de NEJ

NEJ okazigos sian jaran membrokunvenon je dimanĉo la 31-a de oktobro 9:30-11:30 en Ry, Danujo, okaze de KKPS. Reta partopreno kaj voĉdonado plene eblos. Membroj ricevos retmesaĝon kun ĉiuj detaloj.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Pro moderna teĥnologio vi nun eĉ povas perdiĝi rete!

Taŭro: Kontrolu viajn ŝuojn, kiam vi post jaro finfine eliras la domon.

Ĝemeloj: Partoprenu vian sekvan retan kongreson per saĝa fridujo.

Kankro: Vi IJK-umas per poŝtelefono kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Leono: Vegano? Sed kio pri la plantoj? Fotosintezu!

Virgulino: Post nokta homlupa ludo vi ne plu estos.

Pesilo: Vi malkovros, ke pli ĉarmas bebo ol beto.

Skorpio: Aŭgusto estos bona monato por ripozi post julio.

Veronika: Ne indas iri al Esperantujo, simple restu hejme.

Sagitario: Memoru: ekzistas aliaj novaĵfontoj ol Pos-Amiko, legu ilin ankaŭ.

Kaprikorno: Vi nomos vian sekvan infanon Poso.


Akvisto: Vi renkontos ĉarman poŝtiston ekster via pordo.

Fiŝoj: Ne forgesu ĉiumatene kombi la harojn de via avataro.

Venu al la KKPS en Ravnsø, Danio en 2021!

Koko Poso solas en kvaranteno nun jam de longa tempo. Li tiom antaŭĝojis revidi vin ĉiujn en oktobro de 2020, sed laŭ li la dana registaro ne kredas je kokaj rajtoj kiam ili refermis Danion kaj devigis la organizan teamon nuligi la KKPS.

Bonŝance por Koko Poso, DEJO denove klopodas okazigi KKPS en 2021. Estas la sama koncepto, sama loko kaj preskaŭ la samaj datoj!



Koko kunportis al Danio grandan stokon de Stroopwafels de Albert Heijn, per kiuj li plenigas la truojn en sia animo kaj stomako. Nun pasis du jarojn kaj li bedaŭrinde iom dikiĝis.

Venu al la KKPS en Ravnsø ĉe Ry, Danio, inter la 29-a de oktobro kaj 2-a de novembro en 2021.

Aliĝoj antaŭ la 1-a de aŭgusto profitos la plej malmultekostan aliĝperiodon. Do hastegu!

Aliĝu tuj ĉe kkps.esperanto-jongeren.nl!

Ni festos halovenon en ujutna nederlandana etoso en arbaro meze de nenie en Ravnsø ĉe Ry en Danio. Ni ekskursos al la plej proksima ~~monte~~ monteto, la Ĉiela Monto, kiu estas plene grimpebla eĉ kun valizo en la mano.

Krom la nederlandaj kutimaĵoj kiel duontaga ekskurso, halovena balo kaj noktaj manĝoj estos ankaŭ danaj tradicioj kiel gløgg, æbleskiver kaj biero kontraŭ malpli ol eŭro ($\approx 7,46$ kr).



Ne estu koko, venu al la KKPS!